

Dank' al Esperanto

後藤純子¹

Tuj post la terura katastrofo en nordorienta parto de Japanio miaj amikinoj el pluraj landoj esprimis siajn zorgojn pri mi kun teneraj² vortoj sur retaj leteroj.

Jen belga amikino, kiu ankaŭ ĉe la okazo de la tertremego en *Hanŝin* sendis al mi 30 foliojn da bildoj de siaj gelernantoj kun kuraĝigaj mesaĝoj al miaj tiamaj gelernantoj. Jen pola amikino, kiu tiel ektimis pri la giganta damaĝo kaŭzita de la atomcentraloj, ke ŝi rekomendis al mi rifuĝi de la danĝera Japanio kaj invitis min en sian domon. Ŝi mem longe suferis de la katastrofo de Ĉernobilo sub la ventoj de Ukrainio.

Antaŭ 2 jaroj mi ricevis retleteron de nekonatulo, kiu estis prezidanto de Zuriko-Esp-Asocio, kaj li sciigis, ke Zuriko-Juĝejo serĉas mian adreson, ĉar *Alice Kessler*, mia iama amikino (aŭ svisa panjo en mia koro) forpasinta, postlasis al mi mil frankojn per sia testamento. Mi estis tute konsternita kaj kortuŝita. Mi hezitis kaj pripensadis, ĉu mi meritas ricevi tiun monon, kaj daŭre konsideris, kiamaniere utiligu ĝin: ĉu por subteni KLEG-on, JEI-on, aŭ esperantan movadon en Svislando. Ne! Antaŭ kelkaj semajnoj kiel fulmo venis al mi ideo, utiligi la tutan sumon por subteni suferantojn de ĉi-foja katastrofo. Mi tuj plenumis ĝin. Mi kredas, ke certe mia kara *Alice* aprobas tion en la ĉielo.

変わり果て慟哭の地に春の雪

¹ [goto: sumiko]

² **tenera** Montranta mildecon kaj varmecon de sentoj: ~a *edzo*; ~aj *karesoj*; ~e *kisi*. ~**eco**. Varma delikateco de la sentoj. PIV